

N°173
janvier
février
mars
2016

LA INFORMILO

N° 173
januaro
februaro
marto
2016

l'espéranto
la langue de l'amitié
sans frontières

Esperanto
la lingvo de l'amikeco
sen landlimoj



ESPERANTO FRANCE-EST

association culturelle
pour la promotion
de la langue
internationale

ESPERANTO

regroupant
les départements

Bas-Rhin (67)

Haut-Rhin (68)

Meurthe-et-Moselle (54)

Meuse (55)

Moselle (57)

Vosges (88)

Maison des Jeunes
et de la Culture

"Philippe Desforges"

27, rue de la République

FR-54000 NANCY

ABONNEMENT / ABONO

Papera versio: 15€

Reta abono: 7,50€



Duolingo est le moyen le plus populaire au monde pour apprendre les langues. En plus, c'est 100 % gratuit !

 ☆ Chuck Smith, 35 ans est programmeur et
 ☆ dirigeant de l'entreprise de jeux nommée
 ☆ Ludisto. Originaire des États-Unis, il vit à
 ☆ Berlin. Il a commencé à apprendre l'espé-
 ☆ ranto en février 2001 et dans la même an-
 ☆ née, il fonde déjà Wikipedio, la version es-
 ☆ péranto de Wikipédia.
 ☆ Le 28 mai 2015, après 9 mois d'un travail
 ☆ d'équipe, il lançait la version bêta d'un
 ☆ cours d'espéranto pour les anglophones,
 ☆ sur la plateforme en ligne Duolingo.
 ☆ Ce cours a été pris d'assaut dès les pre-
 ☆ miers jours : 9600 inscrits en moins de 2
 ☆ jours...



Chuck SMITH
DUOLINGO ESPERANTO

L'avenir de l'espéranto: les cours en ligne!

Cela n'étonnera personne: la langue internationale ESPERANTO est de plus en plus présente sur la toile! Des millions de pages sont accessibles par simple clic! La généralisation d'internet a révolutionné l'apprentissage de l'espéranto: des élèves des cours en ligne (I-kurso, lernu.net) rejoignent peu à peu les clubs locaux, y pratiquent la langue et participent même à sa promotion.

Un nouveau cours en ligne DUOLINGO est en train de faire sensation dans les pays anglophones. Depuis son lancement en mai 2015 plus de 300 000 élèves ont découvert l'espéranto et chaque jour une trentaine d'entre eux terminent le cours. Les équipes de Duolingo travaillent à une nouvelle version à partir de l'espagnol et envisagent également de continuer avec des cours à partir du russe et du chinois.

LUMINESK

Nova silvestra renkontiĝo de Germana Esperanto-Asocio

IF (Internacia Festivalo) estis por pluraj samideanoj la tradicia renkontiĝo en la jarfino. Iom konkurenca aranĝo estis NR (novjara renkontiĝo), kvankam ĝi celis ĉefe familiojn. Jen fine de 2014 okazis la vere lasta IF, brile organizita de HDP, Hans-Dieter Platz. Tiam ankoraŭ neniu sciis, ĉu okazos anstataŭa nova Esperanto-renkontiĝo. Nur meze de 2015 alvenis informoj, ke Germana Esperanto-Asocio organizas novan jarfinan semajnon, kun eble iom mistera nomo "Luminesk".

Tre verŝajne intertempe pluraj antaŭaj IF-partoprenintoj decidis aliĝi al NR, aliaj akceptis esplori tiun novan Lumineskon, eble pro scivolemo aŭ pro intenca subteno. La ĉefa organizanto estas Andreas Diemel, komisiito de GEA, Germana Esperanto Asocio kun jenaj kunlaborantoj: S-ro Sebastian Kirf, prezidanto de GEA, S-ino Julia Noe, eksredaktoro de TEJO-aktuale, membro de TEĴA-Tutmonda E- ĵurnalista asocio kaj S-ro Alfred Schubert nuna prezidanto de TEĴA-eksa ĉefredaktoro de germana E-aktuell.



Tiu unua Luminesk okazis de la 28a de decembro 2015 ĝis la 4a de januaro 2016 en Nideggen sud-oriente de Akeno. De la malgranda stacidomo de Nideggen-Bruck, Andreas Diemel volonte veturigis la alvenintojn al la junulargastejo, sur monto-supro apud kastela turo.

Sebastian Kirf, prezidanto de GEA, zorgis por la akcepto de la alvenintoj, eble iom tro kaptita por akurate informi sian komputilon.

Multaj vizaĝoj de partoprenantoj jam estis konataj de antaŭaj IF-oj. Tial ja Luminesk aspektas iom la sekvo de IF kun kelkaj malsamaĵoj kaj ankaŭ multaj similaĵoj.

La semajna programo ofertis la eblecon ĉeesti unu prelegon matene kaj du prelegojn en la posttagmezo kun ĉiufoje 3 alternativoj.

La unua prelego pri abel-bredado estis aparte instruiga, pri la laboro de bredisto kaj ankaŭ pri la mirinda vivo de la abeloj kaj ties reĝino. Ni povis gustumi diversajn mielojn kaj ankaŭ mielan vinon.

Alfred Schubert nuna prezidanto de TEĴA-eksa ĉefredaktoro de germana E-aktuell, prizorgis la programon kaj ankaŭ prelegis pri fotado kaj ĵurnalismo.

Tatjana Luskotova el Rusio rakontis kaj klarigis pri Esperanto-instruado, kaj pri siaj spertoj pri instruado en Tajlando, pri vojaĝo al Brazilo, kaj Siberio.

S-ino Liu Jun nun loĝanta en Svislando prelegis pri historia kaj nuntempa svisa fervojo kaj pri sia Esperanto-vivo projekciante plurajn lum-bildojn pri renkontiĝoj en Ĉinio kaj en Eŭropo.



Vizito al ĵurnal-muzeo

Hospitalo en Akeno





En Akeno



La konstanta rapideco de lumo

La du observantoj mezuras la saman valoron por la rapideco de la lumo, kvankam la persono maldekstere moviĝas relative al la lampo!



La tutaga ekskurso gvidis nin al Akeno, kie ni povis viziti la muzeon pri ĵurnalismo, kun sperta tradukado de Alfred Schubert. Eblis kompreni, kiel gazetoj per ricevitaĵaj rekadrigitaj fotoj povas misinformi la legantojn. La tagmanĝo okazis en memserva restoracio por eviti tro longan atendadon. En la posttagmezo ni admiris ŝate aŭ malŝate la modernan hospitalon kun speciala helikoptera platformo. La tuto iom memorigis pri la aspekto de Pompidou-centro en Parizo. En la historia centro de Akeno estis interese ekscii pri la signifo de kelkaj statuoj.

Bonvenon al Tel-Avivo-Jafo ★

La 17-a Israela Kongreso de ESPERANTO
14-16.04.2016

La programo ankaŭ proponis du IVU-ojn (internacia vintra universitato), pri Projektiva Geometrio klarigis kaj prelegis de Yashovardan Singh. Profesoro Amri Wandel prelegis pri relativec-teorio de Einstein. Li montris multajn strangaĵojn rilate al la konstanta rapideco de lumo. Por eskapi de nigraj truoj, necesus veturi pli rapide ol la lumo-rapideco, sed tio ne eblas. Li klarigis ankaŭ plurajn aliajn kuriozaĵojn, kiujn oni povas malfacile kompreni. Alia temo pli facile komprenebla estis Historio de Israelo kun invito al venonta Israela Kongreso en Jafo.

Laŭ instigo de Hori Jasuo el Japanio, Dieter Rooke proponis ekzamenon de parkera kantado de la Esperanto-himno "La Espero".

Dum Vespera programo elpaŝis kuraĝe studento el la regiono, kiu laŭtlegis la Esperanto-version de fantazia rakonto, kiun li verkis en la germana. Certe iuj preferus, ke ĝi estu rakontata laŭ pli aktora maniero.

Plej sukcesa programo estis de juna virtuoza muzikisto kaj kantisto kun Esperanto-nomo "Kaŝi". Li ravis la publikon per sia pianludado kaj mirinda voĉo.

Kun pli da Esperanto-kantoj Birke kaj Bertilo Wennergren agrabligis alian vesperon. Ili estis revenintaj de NR (novjara renkontiĝo en Saarbrücken).



Sebastian kaj Kaŝi

Anoncado de Novjariĝo





En Nideggen



La koruso kantas



Post la vespera programo funkciis knajpo, kie eblis trinki bieron, kaj gustumi lokan specialaĵon "bovan okulon", alkoholaĵon kun iomete da lakto. La lakto kreis tian iluzion, kvazaŭ okulon de bovo. En iom pli kvieta ĉambro, la gufujo, Julia sperte kaj lerte proponis diversajn teojn al siaj gastoj, kiuj



Birke kaj Bertilo Wennergren

ĝuis ne nur la teon, sed ankaŭ la etoson kaj la babiladon. Por la silvestra vespero okazis bufeda manĝo kaj poste la balo kun bonvenigo al la nova jaro, laŭ diversaj hor-zonoj. Por la noktomezo estis proponita grimpi la kastelan turon laŭ koridoroj kaj feraj ŝtuparoj. Tie ni kise tostis al feliĉa nova jaro.



Monschau

Samokaze eblis spekti kaj admiri sur la tuta horizonto de 180° amason da piroteknikaĵoj, kiuj senĉese aperis dum pli ol duon-horo en la diversaj vilaĝoj. Mirinda spektaklo. Malsupre en la salono denove aŭdiĝis la muziko, kiu tamen ne sukcesis, dum pli ol unu horo, allogi dancemulojn. Pluraj ĉeestantoj tion bedaŭris. Ĉu la muzik-gvidanto vane kaj malsperte klopodis? Okaze de duontaga ekskurso ni vizitis en la urbo Monschau mustardo-muzeon. La lerta gvidantino klarigis ĉiujn kvalitojn kaj ecojn de tiuj mustardoj ne nur por la gusto sed ankaŭ por la sano kaj eĉ kontraŭ iuj haŭtmalsanoj. Vera mirindaĵo!

En iu programero Alfred Schubert gvidis la debaton "Planado de la venontaj Lumineskoj". Certe la unua demando estis, ĉu refoje organizi Lumineskon, kiu ja tuj ricevis favoran respondon. Poste, pluraj ĉeestantoj proponis detalajn plibonigojn. Ni taksis, ke tiu unua Luminesko ebligis al la novaj organizantoj spertiĝi kun iom malpli da partoprenantoj ol en lastaj IF-oj.

Evidentiĝis, ke preferata regiono en Germanio estas la okcidenta parto sed ne tro norde. Supozeble la venonta Luminesko, allogos pli da homoj kaj estos certe pli grandioza.

En la adiaŭa verspero refoje eblis ĝui la lertecon de Kaŝi, kiu ege virtuoze pianludis. Andreas Diemel deziris danki al ĉiuj partoprenantoj kaj ĉefe al liaj kunhelpantoj, kiuj plene sukcesis organizi tiun unuan Lumineskon. Por pli bone flegi tiun "kreskantan floron", ĉiuj ricevis verdan akvumilon. Dankon al ili, kun la deziro, ke la venonta Luminesko estu ankoraŭ pli alloga.



Gratulojn al la kunhelpantoj

La 14a Novjara Renkontiĝo en Saarbrücken

27.12. 2015 - 3.1. 2016

Ĝi okazis samtempe kun la Novjara Internacia Semajno (NIS) ĉe la franca limo, en la urbo Saarbrücken jam la 4-an fojon. Partoprenis ĝin kaj kunfestis pluraj gejunuloj kaj multaj junaj familioj kun infanoj, inter kiuj abundis denaskuloj. La unuan vesperon la ĉeforganizanto Lu Wunsch-Rolshoven bonvenigis nin prezentante al ni la prelegantojn kaj la kompletan semajnan programon. Poste ni ĝuis tipajn manĝaĵetojn kaj trinkaĵojn, kiujn la partoprenantoj alportis el diversaj landoj por gustumigi. Agrable estis renkontiĝi kaj babilu kun malnovaj geamikoj kaj konatiĝi kun novuloj.



Al la evento aliĝis pli ol 210 esperantistoj el dudeko da landoj. La partoprenantaro konsistis el beboj, infanoj, gejunuloj, adoleskuloj kaj pli aĝaj personoj, inter kiuj la plej aĝa estis 92-jara sinjoro, kiu eklernis Esperanton surloke. Por infanoj oni pretigis tre varian lud-programon kaj man-laborajn atelierojn, spektaklojn, sportajn kaj tablo-ludojn kaj multajn aliajn aktivaĵojn, inter kiuj ne mankis ĵonglado kaj improviza teatro. Ekstere oni kradrostis sur fajro bananojn kun ĉokolado. La infanajn programerojn prizorgis Nicky Janssen, Christoph Frank kun sia edzino Ines kaj multaj unuopaj gepatroj. Ili prezentis spektaklojn kaj aliajn distraĵojn por ĉies ĝojo. La infanoj kaj gejunuloj amuziĝis laŭplaĉe. La plej malgrandaj dumtage entuziasme spektis Mazi-kurson kaj vesperaj piĝamaj rakontoj de Nicky Janssen ravis ĉiujn etulojn.



Samtempe okazis diversaj kursoj por komencantoj, progresantoj kaj serio de lingvaj temoj kun diversaj detaloj pri gramatiko kun amuzaj ekzercoj kaj enigmoj. Oni lernis ankaŭ dum la promonado en la naturo.



Dum diversaj debatoj oni pridiskutis kiaj E-kursoj kaj E-instruistoj estas bezonataj, kiel allogi kaj varbi gejunulojn kaj interesatojn al E-asocioj?

La programo estis vere riĉa kaj ĉiu povis trovi ion allogan por si mem. Okazis interesaj prelegoj, diskutrondoj, laborgrupoj, atelieroj, abundis muzikprogrameroj, ĉen-dancado, lernado de argentina tango, manlaboroj, ekskursoj.

Ĉiuvespere estis prezentitaj subtitolitaj filmoj. Oni raportis pri la 100-a UK en Lillo. Per kelkaj bildprezentoj ni povis vojaĝi de Nepalo al Kilimanĝaro, pilgrimadi al Kompostelo, admiri kamenojn de feinoj kaj ĉirkaŭi la tutan mondon bicikle.

Ni ricevis informojn pri Duolingo, pri mirakloj de la pluvbarbaro, pri ciforigado kaj ekonomio, pri amaskomunikilaj rilatoj kaj lingvolernejoj, pri menskalkulado, pri budhisma meditado kaj ĝia filozofio, pri socia kaj politika situacio de la indiĝenaj lingvoj en Afriko, pri Israelo, pri Varsovia vento kaj pri Arkones. Eblis spertiĝi en tradukado sub gvido de Brian Moon kaj István Ertl. Pri la situacio en Sirio ni rekte eksciis





de du rifuĝintoj loĝantaj nuntempe en Germanio. Ili parolis pri siaj spertoj, aktualaĵoj, emocioj kaj aventuroj.

Tre interesa estis serio da diskutoj, kiujn reĝisoris Jesper Jacobsen. Temis pri: "Eŭropo-unio de solidareco ĝis kiu punkto?", "Kiel protekti tutmondan heredaĵon, "Energia politiko kaj klimata ŝanĝiĝo", "Enmigrado en Eŭropan Union: ĉu krizo aŭ renaskiĝo?", "La reveno de naciismo en Eŭropo". Interesis diskutoj kaj spertoj pri familia edukado de infanoj laŭ psikologia vidpunkto.

Eblis gimnastiki, triki, feltumi, kanti, danci kaj alimaniere amuziĝi. Bone funkciis la libroservo de FEL. Post la vesperaj



programeroj ni babilis en trinkejo ĉe vino, biero kaj aliaj alkoholaj aŭ senalkoholaj trinakaĵoj ĝis malfrujaj noktohoroj. Ne okazis la tuttaga ekskurso, sed la partoprenantoj ĝuis plurajn promenojn en-urbajn kaj en la naturo. Iuj ĝuis naĝadon en la urba naĝ-baseno.



Post la finiĝinta alia jarfina aranĝo - Internacia Festivalo, la Internacia Vintra Universitato (IVU) transiris al NR, kie okazis la 9-a sesio de fakaj prelegoj. Temoj de la prelegoj estis: "Vivo sur foraj planedoj, Amo, Revolucio de Einstein, Nanoplanedoj". Ĉe la fino la ĉeestantoj trapasis ekzamenon kaj la sukcesintoj akiris AIS-ateston.

Dum la vesperoj ni havis okazon spekti pupteatraĵon kun magiaĵoj de Christoph Frank, ĝui koncerton de baladoj pri amo kaj morto de Birke kaj Bertilo, aŭskulti romantikajn kanzonojn de Ĵomart kaj Nataŝa, kvarvoĉan ĥoron sub gvido de Jesper Jacobsen. Estis organizitaj kvizo Risko kaj diversaj eksperimentoj pri fiziko, kie oni devis diveni - kio okazos?




La Silvestra vespero komenciĝis per bufeda manĝo, poste estis disdonataj atestiloj al partoprenantoj de la IVU-ekzamenoj. Noktomeze ekstere eksplodadis piroteknikaĵoj, kiel bonvenigo de la Nova Jaro 2016 kaj interne ni tustis bondezirante ĉion plej bonan kaj dancis ĝis la mateniĝo.

La partoprenantoj de la 14-a NR ĝuis buntan programoferton kaj amikecan etoson.



Dum la lasta adiaŭa vespero pluraj kontribuis al varia programo ne nur per muziko kaj kantado. Oni sukcesis venigi ĵurnalistojn kaj poste aperis artikoloj pri la aranĝo en la germana kaj franca gazetoj kaj televidelsendo en TV8 Moselle-Est.

Liba Gabalda

| | | |
|---|---|---|
| Espéranto France-Est |  | Orient-Franca Esperanto-Asocio. |
| La Informilo | Bulletin bilingue d'information sur la langue internationale ESPERANTO | Dulingva inform-bulteno pri la internacia lingvo ESPERANTO |
| Rédaction: Redaktoro: | Edmond Ludwig kaj André Grossmann | S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM |
| Les articles à insérer doivent parvenir impérativement à la rédaction dans les délais suivants: | Article manuscrit à éviter Texte envoyé par courriel doc, odt Document avec mise en page (PDF) marges identiques à cette page-ci | un mois 3 semaines 2 semaines avant la fin de chaque trimestre |
| Les articles signés nommément par leurs auteurs expriment la seule opinion de ces derniers. | | |

| Komitato de la Asocio | | Comité de l'Association | |
|---|--|----------------------------------|---|
| Funkcio | Adreso | Telefono | Ret-adreso |
| Prezidanto + PKK <i>Président + Cours par correspondance</i> | S-ro Edmond LUDWIG 26, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR | 03.89.77.52.56 | esperanto.eludwig@orange.fr |
| Sekretario <i>Secrétaire</i> | S-ro Robert KUENY 30, rue des Champs 68690 GEISHOUSE | 03.89.82.37.62 | kueny.robert@neuf.fr |
| Vic-sekretario <i>Secrétaire adjoint</i> | S-ino Catherine KREMER 20, Voie Sacrée 55100 VERDUN | 03.29.85.05.09 03.02.13.01.32 | catherine2.kremer@laposte.net |
| Kasisto - Redaktoro <i>Trésorier - Rédacteur</i> | S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM | 03.89.45.62.89 | andreo.ag08@free.fr por pezaj dokumentoj prefere al andreo.ag09@gmail.com |
| Libroservo <i>Service Librairie</i> | S-ro Jean-Luc THIBIAS 37, rue Pierre et Marie Curie 54500 VANDOEUVRE | 03.83.53.57.54 | thibias.jean-luc@wanadoo.fr libroservo.efe@wanadoo.fr |
| Aliaj komitatanoj | S-ino Liliane BERSWEILER | 03.83.47.41.36 | liliber54@yahoo.fr |
| Assesseeurs | S-ino Micheline COLNOT | 03.83.27.95.55 | michelinecolnot@orange.fr |
| | S-ro Jacques HERLÉ | 03.87.01.00.39 | jacques.herle@laposte.net |
| | S-ro Jacques PINEDA | 03.89.42.88.54 | pineda.ventron@gmail.com |
| | S-ino Simone KIRY | 03.89.57.68.10 | simone.kiry@gmail.com |
| | S-ino Ginette MARTIN | 03.29.24.68.46 | gimavo@wanadoo.fr |
| | S-ino Madette AST | 03 87 01 32 85 06 70 94 11 84 | madette20@hotmail.fr |
| | S-ro Bertrand WICK | 03.89.69.86.42 | bertrand.wick@orange.fr |
| | S-ino Gisèle BERTAPELLE | 03.83.56.17.37 06.80.68.94.78 | bertapelle.gisele@wanadoo.fr |
| | S-ino Catherine HEL | 03.83.47.63.07 | cathello@laposte.net |

| | | | |
|---|---|------------------------|---|
| Abono al La Informilo → | 15 eŭroj | reta abono: 7,50 eŭroj | ← Abonnement à La Informilo |
| Pagoj per ĉeko je la nomo de → | Esperanto France-Est | | ← <i>Paiement par chèque au nom de</i> |
| Pagoj per ĝiro al jena konto → | CCP 1997 72 W NANCY | | ← <i>Paiement par virement au compte</i> |
| Bank- aŭ poŝt-ĉekoj sendataj al la Kasisto Adres-ŝanĝo: Informu al → | S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM | | Chèque bancaire ou postal ou changement ← d'adresse à envoyer au trésorier |

| | | |
|-----------------------------------|-----------------------------------|--|
| 1. Duolingo | 15. Nova urbo Redirekti tendencon | <p>ISSN 0291 6037 trimestriel N° CPPAP : 0409 G 83517 bulletin d'information bilingue sur l'espéranto édité par l'association culturelle Espéranto France-Est MJC PhiJippe Desforges - 27 rue de la République 54000 NANCY Directeur de la publication : Edmond LUDWIG Rédacteur provisoire : André Grossmann Dépôt légal : 30 septembre 2013 Imprimé par <i>l'imprimerie Sprenger</i></p> |
| 2. Luminesk | 16. Nova urbo jaro de guŝoj | |
| 3. Luminesk | 17. Kristnasko-rakontoj | |
| 4. Luminesk | 18. Humuraĵoj- enigmoj | |
| 5. Novjara Renkontiĝo | 19. Ni lernu per distraĵoj | |
| 6. Novjara Renkontiĝo | 20. Abonoj kaj kotizoj | |
| 7. Komitatanoj kaj menuo | 21. Nia vojaĝo en Irano | |
| 8. Angulo de la prezidanto | 22. Nia vojaĝo en Irano | |
| 9. Raporto IFEF | 23. Trafikrimedo en Srilanko | |
| 10. Staĝo-aliĝilo kaj programo | 24. Trafikrimedo en Srilanko | |
| 11. Staĝo-aliĝilo kaj programo | 25. MES en Issambres | |
| 12. Libroservo | 26. MES en Issambres | |
| 13. Armand HUBERT | 27. Trajn-vojaĝo en Barato | |
| 14. Nova urbo Redirekti tendencon | 28. Trajn-vojaĝo en Barato | |

Karaj gesamideanoj,



Ŝajnas, ke tie kaj tie ĉi en nia movado sentebblas ia pesimismo rilate la disvastigon de nia lingvo malgraŭ la nekredablaj eblecoj ofertataj pro la reta komunikado. Sin demandas do prezidanto de Esperanto-asocio, kiel redoni kuraĝon kaj agademion al siaj aktivuloj. Eble la ĉi-posta teskto, kiun mi kopiis en plej valorega verko de la jaro 2015: **Historio de la Esperanto-literaturo** verkita de **Carlo Minnaja kaj Giorgio Silfer (Eldonejo LF-koop)** *.

Inter multegaj pioniroj de nia esperant-lingva literaturo, kies portreton proponas al ni la du elstaraj aŭtoroj, mi elektis eltiraĵon pri **Vasilij Jakovleviĉ Eroŝenko (1890[1908 (jaro de esperantistiĝo) – 1952**, kiun mi tutsimple kopiis en ĉi interese ga enciklopedio.

Jen: "Ukraina instruisto, **blinda jam en la aĝo de kvar jaroj**, li rondvojaĝis tra Britio, Tajlando, Burmo, Hindio, Japanio, fondante porblindulajn lernejojn, prelegante, lekciante en universitatoj pri esperanto kaj la rusa literaturo. La famo parolis pri li kiel poeto en la rusa, kvankam lia atuto estis verkado de mallongaj rakontoj, kaj li famiĝis ĝuste per siaj **rakontoj porknabaj** verkitaj en la japana, kiun li estis rapide lerninta mastri. Arestita en Japanio pro partopreno en demonstracio socialista, li estis procesata kaj sendita al la tute malcentra Vladivostoko, malgraŭ la premo je lia favoro de eminentaj verkistoj. Li tamen sukcesis fuĝi al Ĉinio alivestita kiel kulio, kaj tie li famiĝis per tradukoj de siaj rakontoj en la ĉinan, ofte fare de Lusin**. En Ŝanhajo li komencis verki ne nur sporade ankaŭ en Esperanto, sed dum li vivis, aperis nur unu kolekto de poemoj, rakontoj kaj skeĉoj, *La ĝemo de unu soleca animo* (1923), kaj du rakontaroj: *Turoj por fali* kaj *Rakontoj de velkinta folio* (ambaŭ en 1923); pluraj liaj kontribuoj aperis brajle en **porblindulaj gazetoj Esperanto Ligilo kaj Ligilo por vidantoj**. (...)"

Certe, ne ĉiu ajn sukcesas akiri kaj elradii tian vivemon malgraŭ grava handikapo, sed ĉi ekzemplo eble helpas al ni iom mildigi la pesimismen, kiu ofte bremsas pli energian aktivadon.

Edmond LUDWIG

* La verkon mi ege konsilas al vi. Legu ĝin iom post iom kaj kleriĝu pri niaj verkistoj. La libro estas havebla en la LIBROSERVO de nia senlaca prizorganto Jean-Luc THIBIAS.

**Lusin (1881 – 1936) fondinto de la moderna ĉina literaturo kaj la plej populara ĉina verkisto de la unua duono de la 20a jarcento. Li subtenis Esperanton.



Internacia Fervoja Esperanto-Federacio planas organizi sian internacian kongreson en Colmar en 2017

En la lasta semajnfino de februaro de la 26a ĝis la 29a kunvenis en Colmar en la hotelo Balladins estraranoj de IFEF (el Francio, Italio, Germanio...) kaj esperantistoj el la regiono de Colmar kaj Mul-

house. Tion iniciatis Rodica Todor, nuna prezidantino de IFEF por kune decidi pri la farebleco de tiu tut-semajna aranĝo. Necesis konkrete decidi pri la loko, la programo, la salonoj, la hotelo ktp. Certe jam pluraj proponoj estis faritaj al IFEF, ĉu kongresi en la ferio-centro en Mittewihr, ĉu en hoteloj en Colmar kaj trovi taŭgan salonon en la urbo.

Colmar estas ja tre turisma kaj ege alloga urbo. Certe tio estis forta argumento por tie kongresi. Krome la hotelo Balladins ŝajne plene taŭgas kaj jam konkretaj decidoj estis faritaj.

Pri la kunveno raportas Jean Ripoche....

Raporto pri la printempa estrarkunveno de IFEF (Internacia fervojista Esperanto-Federacio) en Colmar (Francio), 26-29.02. 2016

Ni estis invititaj de la IFEF-estraro por partopreni la Printempan Estrarkunvenon en Colmar (Alzaco). Proksimume 15 personoj kun-atingis tiun lokon. Diable! Kial tiom da partoprenintoj kaj kial koncentriĝi en Colmar... Jen estas la demando?

Sen mallevigi la kurtenon pri la celo de tiu alirado (nur la komitatanoj rajtas decidi), IFEF-estraro opiniis tiun regionon oportuna por proponi ĝin kiel lokon de la IFEF-kongreso en 2017. Kial tiu elekto? Per kelkaj vortoj mi provos klarigi la aferon.

Sed nun ni malkovru tiun riĉan regionon. Jes riĉa laŭ pluraj distingoj.

Historie:

Dum prahistorio inter 5000 kaj 4000 antaŭ nia erao grupo da homoj venintaj el danuba baseno loĝis borde de la riverego Rejno. Multaj restaĵoj videblaj en la kolmara muzeo "Unterlinden" atestas tiun okazaĵon. La ĉeesto de la riveroj "Rejno" kaj "Ill" kaj de ĝiaj konfluejoj grave kontribuis al homa koncentriĝo. Poste alvenis Keltoj, Alamanoj, Romianoj kaj Frankoj.

Geografie:

Colmar kuŝas ene de granda ekonomia kaj demokrata ensemblo konstituita de rejna Eŭropo kun preskaŭ centmilionoj da personoj. La urbo najbaras kun la vogeza masivo kaj ankaŭ la nordaj Alpoj. Colmar situas 60 km-ojn for de Strasburgo.

Fervoj:

Multaj koneksoj al/el eŭropa centro kaj rektaj okcidentaj TGV-oj al Colmar faciligas la alirojn de niaj interresuloj al la urbo Colmar.

Esperante:

En tiu loko agadas spertaj esperantistoj, kiuj plezure kaj efike helpas nin por digne akcepti niajn geamikajn samideanojn, organizi ilian ĉeestadon, proponi diversajn lokajn turismajn allogaĵojn, konigi la regionon pere de prelegoj, de kulturaj folkloraj ensembloj.

Pro tio, okaze de la venonta IFEF-kongreso en Varna ni proponos tiun urbon al la komitatanoj kiel lokon de la postvenonta kongreso. Kompreneble komitatanoj taksos la sugeston kaj memdecidos la sekvon.

Sed ni revenu al nia printempa estrarkunveno. Pro gravaj taskoj farendaj, ni kvazaŭ ne turismis. Kun bedaŭro la tempo mankis por admiri tiun belan urbon alinomatitan la "venicia urbo" pro belega rivereto ĉirkaŭata de belaj domoj, kiu serpentas tra la urba centro.

Ni estis akceptitaj de la lokaj esperantistoj Andreo Grossmann, Edmond Ludwig, Michel Basso, Pierre Huré, Fernando Kinkani kaj Bernard Behra.

Krom la jam cititaj kolegoj ĉeestis tiun kunvenon Rodica Todor nia prezidantino, Vito Tornillo sekretario, Laurent Vignaud, kasisto, Jindřich Tomášek, ĉefkomitatano, Anna Abelovská, honora patrona komitato, Jan Niemann, gvidanto de Faka Komisiono, la komitatanoj Lene Niemann, Jean Ripoché, la komisionaj membroj Jocelyne Millanvoye kaj Josette Vonay.

Kiel kutime multaj faktoj estis diskutitaj. Sinsekve temis pri aprobo de la protokolo de la E-kunsido en Veliko Tarnovo (Bulgario), ĝisnuna situacio en Varna, organizaj aferoj, financaj aferoj, agado de IFEF, eksteraj rilatoj kun UEA, FISAIC kaj aliaj esperantaj asocioj. Ankoraŭ foje la estraranoj ekzamenis la situacion kaj estontecon de IFEF kaj debatis la venontajn estrarkunvenojn.

Longa tempo estis dediĉita al organizo de la 2017 kolmara IFEF-kongreso. Ni ekzamenis la buĝeton kaj rapide ni taksis oportunecon kongresi en Colmar pro diversaj kialoj; ekzemple pro facila alirebleco de la stacidomo al hotelo, pro pli favora prezo rilate la hotelĉambrojn kaj la luadon de la salono. La situacio de la hote-



lo kaj de la salono meze de la belaspekta malnova urbo ankaŭ allogis nin.


Ni kontaktis la servojn de la urbodomo por meti opcion pri la rezervado de la salono, kiun ni sukcese rapide trarigardis kelkajn minutojn antaŭ nia rehejmenigo.

Fine la estraro decidis starigi venontan estrarkunsidon dum la kongreso en Varna.

Ni dankas niajn kolmarajn amikojn pro iliaj afableco, spontaneco kaj agema sinteno.

Jean Ripoché,





ESPERANTO-NANCY-54 kaj

esperanto

France-Est

en amikaj rilatoj kun **BAVELO**
invitas vin al la :

79a Regiona Staĝo de Esperanto la 22/23/24ajn de aprilo 2016
en Centre de Loisirs d'Art-Sur-Meurthe
36 avenue de la Chartreuse, FR-54510 ART SUR MEURTHE
(N.48.66217° E.6.25104°)

Nia ĉi-jara regiona staĝo okazos en verda kaj trankvila distrocentro je dek kilometroj de Nancio. Meze de 11-hektara parko proksima de rivero Meurthe, ni disponos je unu el la 6 konstruaĵoj por laŭplaĉe lerni, babili, ridi, aŭskulti prelegojn, ĝui kantan spektaklon, rigardi farmbestojn ... aŭ trafoliumi la 700 titolojn de nia libroservo ! Ni ankaŭ povos manĝi kaj dormi surloke kaj turismen en la ĉirkaŭaĵo.

Venos specife al nia staĝo : Iŝtvan Ertl, kiu prelegos pri literaturo, Nataŝa Bertse el Svedio, kiu kantos dum la sabata spektaklo kaj Catherine Kremer, kiu faros prezenton pri la Unua Mondmilito.

Por atingi C.L.A.M. el la stacidomo de Nancy, uzu la buson de linio 13, kaj eliru ĉe la haltejo "Repentir"



Provizora Programo:

Vendrede 22-an de aprilo 2016

- 17a Akcepto de unuaj alvenantoj
- 19a Vespermanĝo
- 20a Interkona vespero
Ebleco viziti Nancion por la interesatoj

Sabate 23-an de aprilo 2016

- 8a00 ĝis 9a30 Matenmanĝo
- 9a30 Vizito al la Muzeo pri la salo
- 12a30 Tagmanĝo
- 13a30/14a30 Akcepto de pliaj alvenantoj
- 14a/14a30 Prezento de la novaj libroj de la Libroservo
- 15a Kursoj A, B, I
+ prelego de Iŝtvan Ertl
- 18a libroservo
- 19a Vespermanĝo
- 20a30 Distra vespero: kantado de Nataŝa Bertse

Dimanĉe 24-an de aprilo 2016

- 8a ĝis 9a Matenmanĝo
- 9a /10a30 Kursoj A, B, I
Daŭrigo de prelego de Iŝtvan Ertl
- Prezento de Catherine Kremer pri la Unua Mondmilito, por la anoj de la paroliga kurso kaj aliaj interesatoj.
- 10a30/12a Daŭrigo de la tri kursoj kaj de la prelego de Iŝtvan Ertl
- 12a30 Tagmanĝo
- 14a Fino de la staĝo (eble kunveneto de la komitato de Esperanto France-Est.)

KURSOJ

A: Komencantoj (débutants)

Cours pour débutants par Catherine Hel.

B: Paroliga kurso

Gvidas Edmond Ludwig

D: Seminario:

Iŝtvan Ertl pri literaturo

Catherine Kremer pri la Unua Mondmilito

I: Infana kurseto (Ginette Martin)

KURSOJ (kurslibro aĉetebla surloke eble estos necesa)

Por pliaj informoj :
esperanto-nancy-54@laposte.net
poŝtel. 00 33-(0)6.76.54.77.78

Daŭre aktualigitaj informoj:
http://esperanto.alsacelorraine.perso.sfr.fr

La aliĝ-kotizo entenas la partoprenon al elektita kurso aŭ prelego kaj al la distra vespero.



Eksterlandaj partoprenantoj ricevos senpage nian bultenon **La Informilo** dum unu jaro.

Atentu: la nombro de disponeblaj litoj estas limigita: la unuaj respondintoj estos la unuaj servitaj. Se ne plu estos litoj en dulita ĉambro, eble povos esti proponita lito en plur-lita ĉambro, aŭ necesos trovi ĉambron en proksima hotelo .

| ALIGĜOJ | | | |
|---|------|--|------|
| | | 1 lito por unu nokto en dulita ĉambro: | 15 € |
| | | Mantenmanĝo: | 4 € |
| | | Tag- aŭ vespermanĝo sen trinkaĵo (eblas vegetarana manĝo) | 10 € |
| | | 1 lito por unu nokto en dulita ĉambro + matenmanĝo | 19 € |
| | | duon-pensio: 1 lito por unu nokto en 2-lita ĉambro + matenmanĝo + 1 manĝo sen trinkaĵo | 26 € |
| | | kompleta pensio: 1 lito en 2-lita ĉambro + matenmanĝo + 2 manĝoj sen trinkaĵo | 32 € |
| Ĉef-aliĝanto abonanta "La Informilo"n aŭ loĝanta ekster Francio | 25 € | | |
| Ĉef-aliĝanto ne abonanta "La Informilo"n kaj loĝanta en Francio | 40 € | | |
| Kun-aliĝanto (sama adreso kiel ĉef-aliĝanto) | 18 € | | |
| Junulo inter 10 kaj 25 jaroj | 12 € | | |
| Infanoj malpli ol 10 jaroj | 3 € | | |

Aliĝilo por la **79a Regiona Staĝo de Esperanto la 22/23/24ajn de Aprilo 2016 en FR-54510 ART SUR MEURTHE**

| S-ro S ino | Familia nomo | Persona nomo | Malpli ol 25 aŭ studen- to | Aliĝ- kotizo | Elektita kurso |
|---|--------------|---------------|----------------------------------|-----------------|-------------------|
| 1 | | ĉef-aliĝanto | | | |
| 2 | | kun-aliĝantoj | | | |
| 3 | | | | | |
| 4 | | | | | |
| Adreso | | | | | |
| Mi preferas vegetaran manĝon (signu) <input type="checkbox"/> | | | | | |
| Telefono: | | | Ret-adreso: | | |
| Mi pagas (minimуме la aliĝkotizon) jenan sumon: € per ĉeko <input type="checkbox"/> per ĝiro <input type="checkbox"/> al Esperanto Nancy 54 CCP 4786-82 J NANCY Eksterlandanoj pagos surloke. Krom grava evento, la aliĝ-kotizo ne estas repagebla. | | | | | |
| Mi deziras ricevi mapeton por helpi dum la alveno al la staĝo (signu) <input type="checkbox"/> | | | | | |



Nataša Bertse koncertos

Bonvolu sendi la aliĝilon kaj vian antaŭpagon al :
Micheline Colnot
15 rue de Lavaux
54520 LAXOU
Ĉekoj nome de:
Esperanto Nancy 54
CCP 4786-82 J NANCY

Pliaj informoj ĉe
esperanto-nancy-54@laposte.net
poŝ-tel. 00.33.(0)6.76.54.77.78

La surloka organizado estas prizorgata de la grupo de Nancio
Por la distra vespero ni ĝuos la koncerton de Nataša Bertse.

| Nombro da manĝoj kaj da tranoktadoj en C.L.A.M. | Vendrede 22 | Sabate 23 | Dimanĉe 24 |
|---|----------------|--------------|---------------|
| Matenmanĝo | | | |
| Tagmanĝo | | | |
| Vespermanĝo | | | |
| 1 lito en dulita ĉambro | | | |



El nia libroservo

Informoj



La libroservo kompreneble partoprenos la venontan komunan staĝon en Art Sur Meurthe, apud Nancio, la 22/24ajn de aprilo.

Ĝiaj 700 libroj estos tie haveblaj ! Ili ne estos videblaj sur ekrano aŭ revuo sed tuŝeblaj kaj foliumeblaj !

Bonvenon al ĉiuj el vi !

Atendante tiun gravan eventon, eblos malkovri ĉi tiujn nove alvenitajn librojn :


Ĝis baldaŭ !

Jean-Luc Thibias



Nove alvenintaj libroj:


①




②




③




④



⑤



⑥



⑦



⑧



- 1) **Sendependaj homoj**, Romano, **Halldór Laxness**, *Mondial* (2007), 480 paĝoj. **24 €**. Pri la vivo, kredo kaj laboro de islanda kamparano, kiu provas konservi sendependencon por si kaj sia familio.
- 2) **Blanko sur nigro**, membiografia romano, **Ruben Gallego**, *Mondial* (2015), 134 paĝoj. Prezo: **10,80 €**. Pri vivo de hispan-devena rusa handikapulo en Sovetio kaj, post ties disfalo, en Hispanio.
- 3) **Princo Serebrjanij**, romano, **Aleksej Tolstoj**, *Mondial* (2008), 288 p, **20,10 €**. La fama rusa verkisto invitas nin en la tempo de Ivano la Terura, Boriso Godunov, bojaroj, kozakoj, tataroj kaj rabistoj. . .
- 4) **La Edda** mitologio, **Snorri Sturluson**, *Mondial* (2008), 162 p, **15 €**. Pri mitologio el nordaj landoj.
- 5) **Lotte en Weimar**, romano, **Thomas Mann**, *Mondial* (2005), 450 p, **27 €**. . Romano el nobelpremiita germana verkisto, skribita dum antaŭmilita periodo, pri reveno en Weimar de Ĉarlota Kestner, deziranta revidi Goethe.
- 6) **Joĉjo**, legolibro, **Elsa Otto**, *Internacia Esperanto Instituto* (1985), 98 p, **4 €**. Eta legolibro por komencantoj kaj precipe infanoj uzanta facile komprenebla lingvo.
- 7) **Esperanto lernolibro por popollernejoj**, legolibro, **Arthur Degen**, *Hirt & Sohn* (1930), 68 p, **4 €**. Legolibro por lernejoj de unua kaj dua lernjaro.
- 8) **Ŝtono de helpo**, Romano, **Hans Warren**, *Esperanto kultura servo* (1989), 72 p, **4 €**. "Ŝtono de helpo estas la drameca historio pri amikeco, amo, malamo kaj morto, kiu finiĝas korŝire".

Por mendi librojn:

1. Vi sendas vian mendon
 - per poŝto al : Libroservo 37 RUE PIERRE ET MARIE CURIE 54500 VANDOEUVRE (uzante la ĉi-dorsan mendilon)
 - per e-poŝto al "libroservo.efe@wanadoo.fr"
 - nur escepte per telefono: 03-83-53-57-54. Nur post la 20a horo.
2. Vi baldaŭ ricevos viajn librojn kun fakturo (libroj + sendkostoj)
3. Vi pagas vian fakturon per poŝta ĝiro al "libroservo 2800-76 H NANCY" (indikinte sur ĝin la numeron de la fakturo), aŭ per mandato aŭ ĉeko je la nomo "libroservo" sendita al la adreso de la libroservo.
Eksterlandanoj povas sendi internacian ĝiron al "LIBROSERVO"
IBAN : FR 98 20041 01010 0280076H031 97
BIC : PSSTFRPPNCY., indikante en la koresponda linio la numeron de la fakturo.

Mendilo

Bonvolu sendi tiujn librojn al jena adreso:

S-ro/S-ino

En

la

Subskribo:

Page dans l'Ami des Foyers Chrétiens / 14/ 02/ 2016
 Questions de Jacqueline Mouzard, journaliste, à
 Armand HUBERT, délégué de UEA.

*** C'EST QUOI L'ESPÉRANTO?**

L'espéranto est une langue internationale, élaborée
 il y a 125 ans par un médecin polonais. Il a donné
 naissance à un mouvement implanté dans 103 pays.

Je suis membre de cette association et partage
 ainsi un sentiment de proximité avec des hommes et
 des femmes de nombreux pays. L'espéranto élargit
 l'espace de vie et nourrit le sentiment d'être citoyen du
 monde.



*** M. HUBERT, QUEL FUT LE DÉCLIC POUR APPRENDRE CETTE LANGUE?**


Je l'ai appris à 60 ans avec Denise, mon épouse.
 Quand nous voyagions à l'étranger, nous étions déçus
 de ne pouvoir rencontrer des gens dans de bonnes
 conditions d'échange. Notre anglais – et celui des
 autres-ne nous satisfaisait pas.

L'espéranto a été le sésame qui nous a ouvert
 des portes dans les pays visités. Une certaine con-
 nivence, comme un zeste de fraternité, se manifeste
 parmi les espérantophones.

*** L'ANGLAIS AUJOURD'HUI S'IMPOSE COMME "LANGUE INTERNATIONALE".**

“Depuis la nuit des temps, les peuples soumis
 cherchent à parler la langue du vainqueur et à imiter
 sa façon de vivre. □ Ibn Khaldun, historien arabe, le
 constatait au XIVe siècle.


Les concessions faites au plus fort et la
 fascination pour le plus performant restent d'actualité.
 La promotion de l'anglo-américain est acquise pour le
 public. L'espéranto est une activité de traverse: il
 écarte l'allégeance universelle au plus fort.



*** FACE À L'ANGLAIS, RESTE-T-IL UNE PLACE POUR L'ESPÉRANTO?**

L'anglais est devenu la langue de la science, du
 commerce, du tourisme, des instances internationales:
 il est l'apanage du succès et réservé au "pays d'en
 haut". Alain MINC donne le ton pour justifier le "tout
 anglais". Il déclare: "Pour toutes les élites 'offshore' de
 la planète, l'usage de l'anglais est le premier signe de
 reconnaissance. □

Je vis l'espéranto comme un supplément à
 l'anglo-américain: il développe le volet humaniste de la
 mondialisation envahissante.



***QUEL FUT VOTRE ATTRAIT POUR L'ESPÉRANTO?**

Je me suis engagé dans la Défense des droits de
 l'Homme pendant trente ans. En particulier, j'ai
 présenté des expositions et des exposés dans les
 lycées et collèges de Sarreguemines et environs de
 1995 à 2002. Pour la promotion de la Déclaration
 universelle et du Manifeste 2000 de l'UNESCO.

Pour l'Unesco, "Les accords politiques et com-
 merciaux ne suffisent pas pour assurer la paix, cette
 paix ne sera établie que sur la solidarité qui implique le
 dialogue et le respect de l'autre. □ (Extrait du Texte
 fondateur de l'Institution)

L'espéranto a endossé cette optique-là. C'est un
 bel engagement.

*** QUEL AVENIR POUR L'ESPÉRANTO?**

J'oserais un parallèle avec l'écologie. Nous
 voulons conserver la vie et sauvegarder la nature
 autour nous. La conscience de notre responsabilité
 vis-à-vis de l'environnement va devoir s'amplifier et
 impliquer la majorité de la population.

Si nous voulons vivre en paix, l'engagement pour
 les droits de l'homme devra s'amplifier aussi.

La Déclaration universelle y invite: "... chercher à
 mieux se comprendre, se tolérer et développer l'amitié
 entre les peuples. □ (DUDH art. 23 § 2). C'est la raison
 d'être de l'espéranto.



Ĉagrenigas min tia mondo, en kiu la plej riĉaj skribas la rolon nur por tio, ke la ceteraj ilin obeu. (A. Deaton)

Redirekti la tendencon

Eĉ post jaroj de financaj perturboj, la Stokholmaj konsultantoj premias la ekonomistojn kiuj – per siaj studoj kaj laboro – promocias la ekonomion delonge gvidantan al generado de konstantaj krizoj. Okazas tamen, precipe en lastaj jaroj, la bonaj esceptoj. La ĉijaran Nobel-premion pri ekonomiko ricevis brito **Angus Deaton** por la "Studoj pri konsumado, malriĉeco kaj bonstato". Komenton pri tiu premio prezentas L. Bruni – profesoro specialiĝanta pri la internacia reto de firmaoj, laŭ principoj de EoC (Ekonomiko de Komunio en Libereco*).



En la hodiaŭa scienc-situacio, la Nobel-premio por Angus Deaton atentigas pri aliaj, ofte neglektitaj faktoroj de la moderna ekonomiko: sociologion kaj politikon. Ĝis nun, politiko de la Stokholma komitato estis iom stranga. Tio evidentiĝas precipe en lastaj jaroj, kiam kapitalismo ŝajnas eniri la riskon de kolapso sub la premo de la sen-precedencaj financaj krizoj. La bona signo estas tio, ke dum lastaj jaroj la Nobel-premioj pri ekonomio estis donacitaj ankaŭ al tiuj kelkaj sciencistoj, kiuj ne nur difinas ekonomian kaj financon paradigmojn sed ankaŭ malkovras publike ilian tragedian limitecon. Oni povas tion kompari kun varmega somero, kiam oni premias specialistojn pri modernaj fajroestingiloj dum okazas krimbruligoj.

La ĉijara premio al prof. Deaton memorigas pri nomoj de aliaj laŭreatoj, pioniroj de la novaj vojoj: Amartya Kumar Sen – 1998, Joseph Stiglitz – 2001, Elinor Ostrom – 2009, Lloyd Shapley – 2012, Eugene Fama – 2013 kaj Jean Tirole – 2014. Ilia laboro kaj esploroj esperigas nin, ke la malnovaj tendencoj turniĝas jam al bona direkto. Ni ne forgesas pri la ekonomiaj kaj financaj krizoj kiujn multaj ĵus devis travivi. Tiuj krizoj ankoraŭ ne finiĝis kaj ili ne estas sendependaj de la ekonomiaj teorioj formulitaj en lastaj jardekoj. Kvankam tia rilato malsamas ekz. inter astrofizikistoj kies teorioj ne povas modifi la orbitojn de planedoj, tamen – kontraŭe al astrofiziko – ekonomistoj kun siaj teorioj forte influas la solv-eblecojn de la decidpovaj komisionoj. Dum la antaŭaj jaroj, la plej progresintaj ekonomiaj institucioj dungas multe da matematikistoj sen ĝenerala scio pri humanistaj kaj sociaj sciencoj. Tiel malvasta specialiĝo malfaciligas superrigardi la ekonomian sistemon laŭ ĝusta perspektivo. Pro tio, la modeloj de ili kreitaj ne kongruas kun la sociekonomia realeco.

Lastjaraj du premioj, tiu al Tirole en 2014 kaj la ĉijara al Deaton – povas indiki je reveno al eŭropecaj teorioj de ekonomiko. Tradicie, ili ampleksas la socian faktoron de ekonomio, pli senteman al kolektiva bono ol la usona – fokusita pri individua profito kaj riska je perturboj. Tia "tagiĝo" konfirmos eniron al nova vojo, kiam la sekvontjaraj premioj akcentos la socian, etikan kaj filozofian aspektojn de ekonomiko, entute pli adekvatajn ol tiu de nura matematiko. Brita ekonomisto Robert Sudgen en jaro 1991 esprimis la opinion ke "... *La hodiaŭa ekonomisto bezonas reveni al la freŝaj fontoj por rigardi la problemojn ne nur kiel matematikisto, sed ankaŭ kiel filozofo*". En pasinteco, tia invito ne povus esti rimarkita de profesiuloj en tiu segmento. Sed nun ni eble ne malfruiĝos.



Angus Deaton verkas ne nur artikolojn pri matematiko sed ankaŭ librojn, inter kiuj oni rekomendas legi precipe tiun laste eldonitan - "*Granda eskapo: sano, riĉeco kaj originoj de malegaleco*". En tiu libro la Nobel-premiito demonstras ankaŭ la scion pri sociologio, pro tio oni povas lin nomi prava heredanto de la klasika ekonomisto kaj filozofo Adam Smith.

Deaton starigas la demandon ĉu en estonteco la homaro ĝuos periodon de progreso *sen* malegaleco. Tio estas la fundamenta problemo hodiaŭ. Klare videblas, ke por la nuna progreso ni pagas troan prezon per la kreskanta malegaleco inter la kelk-elcenta grupo de "bonŝanculoj" kaj la cetera plimulto de la monda loĝantaro, senigata de la baza rajto al feliĉo. Ekonomio povas reveni al sia originala celo, por estiĝi denove la scienco pli sociema kaj morale pozitiva. Tia ŝanĝo povas okazi, se ni kuraĝos alfronti tiajn demandojn, kiujn oni evitas ĉar preferas paroli nur pri surpraĵaj temoj, senutilaj al homa progreso.

Luigino Bruni

Kompletan liston de la premiitoj vi povas legi ĉe: https://eo.wikipedia.org/wiki/Nobel-premio_pri_ekonomiko. Verkinte ĉi tiun artikolon, ni memorigas ke tian premion en jaro 1994 ricevis esperantisto, s-no Reinhard **Selten**. Tre interesa kaj kuraĝa estis lia parolado en Eŭropa Parlamento: <http://liberafolio.org/2007/seltenparolado/>.

Oceanio – eĉ de semoj malgrandaj . . .



Meze de la ĵus pasinta januaro renkontiĝis 540 homoj el diversaj partoj de Aŭstralio kaj 169 reprezentantoj el kelkaj insuloj de Oceanio: Kiribato, Nov-Kaledonio, Valiso kaj Futuno. Ili alveturis por partopreni en Mariapolis – unusemajna "urbeto" organizita sur Insulo Philip (14 kmj sudoriente de Melbourne / *Melburno*). Plimulte tio estis familioj kun infanoj kaj junularo; venis ankaŭ la novaj loĝantoj de Aŭstralio (rifuĝintoj el Sirio kaj el Burundo). Oni elektis la ĉeftemon "Konstrui unuecon en multkulturismo" - kio tre aktualis por la evento, kiun partoprenis la homoj de malsamaj kultur-fonoj.

Precipe interesa estis kontribuo de la Pacifikaj insulanoj pro la ekzotikaj vestaĵoj, muziko, dancoj ktp. Antaŭ ilia alveno, oni sukcesis kolekti monon por pagi iliajn vetur- kaj loĝkostojn. Ne facilis veturi por Kiribato-grupo ĉar tie estas granda senlaboreco, pro kio estis riske forlasi laboron ĉe la maro – eĉ por unu semajno. Tamen alveninte, ili tre ĝuis amikecan etoson de tiu internacia evento. Ĉiu tago finiĝis – kvazaŭ veturo ĉirkaŭ la mondo – per celebrado de alia nacia kulturo kaj oni povis praktike sperti ke unueco de la popoloj ne estas utopia. Alvenintoj el Oceanio estis invitataj pasigi sekvan semajnon en Melburna Fokolara Centrejo kaj partopreni kursojn pri familia vivo. Aktivecoj en tiu kursaro agordigis ilin per la entuziasmo, kiun ili portos al siaj insuloj.



Tiuj travivaĵoj esperigis ilin kaj denove pravigis la proverbon ke "eĉ grandaj fruktoj maturiĝas de malgrandaj semoj".

*

Nova Urbo (New City / Città Nuova) estas internacia magazino eldonata de Fokolara Movado en kelkdeko da lingvoj. Ĝi antaŭenigas ideojn kaj konkretajn projektojn serve al reciproka kompreno kaj unueco en familioj kaj komunumoj, kaj krome – je pli vasta skalo – inter homoj de diversaj nacioj, kredoj kaj sistemoj. Fondinto de tiu movado, Chiara Lubich ricevis UNESKO-premion por Paca Edukado en decembro 1996. Sekvajare, dum sia vizito en usona urbeto Mariapolis-Luminosa, ŝi pozitive respondis al nia propono eldonadi la bultenon "Nova Urbo" en Esperanto.

Internacian Jaron de Guŝoj (IJG-2016) anoncis la UN dum sia 68a Ĝenerala Kunveno, aŭtune 2013. Pri realigo de "IJG-2016" respondecas Nutraĵa kaj Agrikultura Organizaĵo **FAO** kunlabore kun registaroj kaj aliaj organizaĵoj. Nun vi povas rigardi tre belan, unu-minutan filmeton, kiun FAO kuraĝigas diskonigi: <https://www.youtube.com/watch?v=xggFJv1tVco>. IJG-2016 celas atentigi publikan opinion pri nutraj valoroj de guŝoj por la tutgloba loĝantaro.



Jaro de Guŝoj

La ĉijara IJG kuraĝigas pliriĉigi la manĝoĉenon per pli ofta uzado de guŝ-proteinoj tra mondaj manĝomerkatoj kaj aplikado de guŝaro en kultivocikloj.



2016
*Internacia
jaro de guŝoj*

Ĉi tie vi trovas la oficialan IJG-retpaĝon en ses lingvoj (*ĉina, araba, angla, franca, hispana kaj rusa*): <http://www.fao.org/pulses-2016>. Antaŭe oni ne sufiĉe alte taksis avantaĝojn de tiaj rikoltoj, kiuj inkludas pli da fazeolo, pizo kaj aliaj guŝoj. Sed ili certe faciligos atingi futuran sekurecon de la monda nutrado.

Guŝaj semoj kaj fruktoj estas la dua (post cerealoj) plej grava fonto de plantaj manĝaĵoj por la homo. En agrikulturo oni vaste uzas guŝojn al *verda sterkado* kiel antaŭrikolto en kultiv-ciklo, ĉar ili plej efike taŭgas por nitrogena fiksado. Per tiu biokemia proceso la grundo fekundiĝas, sen kio maleblas akiri bonajn rikoltojn. Eble sonas ironie la memorigo ke la t.n. "Verda Revolucio" en la pasinta jarcento kaŭzis malkreskon de la guŝ-rikoltoj ĉar tiam oni promociis ĉefe grajnoj (kiel ekz. tritiko, maizo kaj rizo). Hodiaŭ oni konfirmas, ke guŝoj enhavas duoble pli da proteino, mineraloj, amelo, dieta fibro kaj mikroelementoj ol aliaj popularaj plantoj. Pro tio, pli kreskigo kaj surmerkatigo de guŝoj certe helpos redukti la nesufiĉan kvanton de tiuj mineraloj kaj aliaj mikroelementoj en la ĉiutaga nutrado.



Malgraŭ la klimat-ŝanĝoj, Afriko povas nutri Afrikon

Precipe tio validas por evolulandoj, kie guŝoj helpas atingi nutrosekurecon per sufiĉaj rikoltoj en daŭripova agrikulturo. Ekzemple unu el la plej malriĉaj landoj - Etiopio apartenas hodiaŭ al grandaj produktantoj de kikero (sesa pozicio en la mondo!). Ĉar mankas tie rimedoj kaj teknologio, antaŭ nelonge oni instalas en tiu lando tre grandan kaj plej modernan maŝinaron kiu plibonigos prilaboradon de rikoltitaj plantoj. Cetere, ankaŭ la okcidentanoj devus rekonsideri pli oftan uzadon de la guŝoj kaj de aliaj freŝaj manĝaĵoj anstataŭ amase aĉetadi tiujn konservitajn kun malalta nutraj kvalito.

Plurjaraj esploroj pri la digesta sistemo fariĝis turnopunkto en la nutroscienco. Ili pruvis ke nombro de la utilaj mikroboj konstante malkreskas en intestoj de la homoj vivantaj en la Okcidento.

Kaŭzas tion la pli kaj pli populara manĝado de fizike kaj kemie transformitaj produktoj, en kiuj mankas tiaj elementoj, per kiuj vivas la menciitaj mikroskopaj organismoj. Se tia tendenco daŭros plu, tiam la necesaj por nia sano mikroboj formortos kio estus tre danĝera por sano de la sekvontaj generacioj. Tio ne minacas al loĝantoj de tiuj regionoj kaj vilaĝoj, kie oni manĝas simplajn kaj freŝajn produktojn. Evidentiĝas, ke guŝoj havas tre gravan rolon por plibonigi homan sanon, al kio ili kontribuas per sia riĉ-enhavo de proteino, mineraloj, mikronutraĵoj kaj diet-fibro. Do la iniciato de UN pri "Jaro de Guŝoj" estas la ĝustatempa atentigo, ke en niaj kuirejoj estu pli ofte uzataj guŝoj kaj freŝaj plantoj kaj malpli da viando aŭ produktoj fabrike preparitaj en ladskatoloj, plastikaj boteloj ktp.



Por prepari bongustan manĝaĵon el guŝoj, vi trovos facile amason da receptoj.

Kristnaskaj rakontoj el franca Kanado el Louis Fréchette tradukis esperanten : V.Beaupré, F.Lorrain (aĉetebla ĉe UEA)

Récits de Noël originaires du Canada français


La aŭtoro de tiu rakonto estas juna franca kanadano, kiu volas reveni al sia patrino por Kristnasko, post longega restado en la Nordo.

Li trairas sovaĝajn kaj dezertajn regionojn kun la helpo de indiana ĉiĉerono, kun sledo kaj hundoj.

Ili trafas la lastan parton de sia longega vojaĝo, post ofta tranoktado sur neĝo.

Malfeliĉe, neĝa ŝtormo okazis kaj ili perdiĝis.

La heroo de la rakonto ĵus konstatis, ke ili estas tro for okcidente rilate sian itineron.



Après avoir changé de direction, nous avons continué à lutter pendant quelques heures, à vrai dire non pas dans l'espoir d'atteindre le fort, mais celui de trouver du bois de chauffage nécessaire pour notre bivouac. J'étais mort de fatigue et je suivais les chiens, trébuchant sur mes jambes molles, et avec un cœur lourd de désillusion.

Soudain, l'indien qui me précédait a crié : " Un arbre ! ". Un arbre ? Est-ce vraiment un arbre debout tout seul au milieu de la grande prairie. Impossible ! L'indien rêve sûrement. Cependant j'ai tiré ma hache du traîneau et me suis rapproché de lui.

Vraiment, juste devant nous, il y avait un tronc nu sans aucune branche, tout droit debout sur la plaine déserte. Pendant un moment, je suis resté debout, médusé. Mais soudain mon cœur a bondi et j'ai laissé échapper un cri - un cri étouffé par un sanglot. Ce tronc nu sans écorce, cet arbre sans vie sortant du sol comme un mât solitaire au milieu d'un océan, avait été planté par des mains humaines. C'était un poteau télégraphique.

Nous avons dépassé l'arrêt d'Athabaska et nous étions sur la route vers Edmonton.

Pouvez-vous comprendre ? Un poteau télégraphique ! Un gardien avant-coureur de la civilisation. N'était-il pas comme une main amicale tendue vers moi depuis le sol de mon propre pays, comme un salut du monde retrouvé, une invitation vers un pays vivant, cultivé, habité par des gens intelligents, des camarades et des amis ?

N'était-ce pas... n'était-il pas déjà ma maison ? J'étais en train de revenir à la vie sociale après vingt-deux longues années d'exil dans des solitudes sauvages.

Même plus, j'étais en même temps quasiment revenu dans la vie de famille, car ce poteau télégraphique que j'entendais bourdonner au-dessus de ma tête me reliait au passé; il me reliait à mon village, avec le toit paternel maintenant plus cher que jamais, à ma pauvre vieille mère vers laquelle je m'imaginai presque pouvoir envoyer un cri de joie et d'encouragement, malgré les longs 3000 miles qui se trouvaient encore entre nous.

Est-ce que vous pouvez comprendre ? Ah! mais pour sentir ce que j'essaie d'exprimer, vous devriez vous-même avoir vécu tout cela.

Perdu sur la route comme je l'étais sous un ciel arctique, au milieu d'un désert glacé, avec tous les souvenirs de la sainte veillée de Noël dans mon cœur désespéré, j'ai senti mon esprit vaciller devant ce symbole inattendu qui signifiait l'échange, l'union, la civilisation.

tradukita de Catherine Roux-Harelle

kun la helpo de Ginette MARTIN

Humuraĵoj

Humuraĵoj

Virino revenas de aĉetaĵoj kaj trovas la edzon en lito kun ĉarma junulino.

- Ne krii, karulino, mi klarigos al vi. Tiu kompatinda virino pet-veturis. Ŝi ŝajnis tre mizera, ŝi ne manĝis de tri tagoj. Mi donis al ŝi restaĵojn de nia tagmanĝo. Mi ankaŭ donis al ŝi vestojn kaj ŝuojn, kiujn vi ne plu utiligas. Ŝi tre dankis, ŝi estis preta por foriri, kaj subite ŝi diris :

- Ĉu ankaŭ alia objekto estas ne-utiligata de via edzino ?

Riĉa virino telefonas al la polico :

- Terure ! Oni ŝtelis ĉiujn juvelojn miajn. Mi suspek-
tas mian ŝoforon Viktor.

Ĉe la fino de la tago, ŝi telefonas denove al la poli-
co :

- Halo ! Mi estas konfuzita, mi retrovis miajn juve-
lojn, vi povas liberigi Viktoron !

- Tro malfrue, sinjorino, li ĵus konfesis sian kulpon !

Viro ĉe la kuracisto :

- Mi ne bone fartas. Mi estas ĉiam laca.

- Ĉu vi bone dormas ?

- Jes, dum ok ĝis dek horoj nokte.

- Ĉu vi bone manĝas ?

- Jes, tri foje tage

- Kaj sekse, kia estas la stato ?

- Du aŭ tri foje monate

- Estas malmulte !

- Vi scias, por kampara pastro, estas jam multe !

Viro rakontas al sia amiko:

- Farite ! De hodiaŭ mi estas patro !

- Bona novaĵo ! Kiel vi nomas la bebon ?

- Ho, estis problemo, mia edzino deziris Bernardo
kaj mi deziris Arno.

- Kaj finfine ?

- Ni elektis Kristina !

Matematikaj enigmoj

• La patro, la tri filoj kaj la pomoj

“La patro aĉetis kvanton da pomoj. Tion li disdividis al siaj tri filoj. Al la unua li donis la duonon de la tuta kvanto plus duonpomon. Al la dua li donis la duonon de la restinta kvanto plus duonpomon. Same li agis kun la tria filo. Fine, ne plu restis eĉ unu pomo. Kiom da pomoj aĉetis la patro? Kiom da pomoj ricevis ĉiu filo?”



tri fojojn kaj ĉiufoje la pigrulo pagis la diablon per 24 eŭroj. Fine en lia poŝo ne plu restis mono. Ĉu vi povas diveni kiom da mono havis la pigrulo dekomence en sia poŝo?

• Problemo de Vidmano (1489)

“Leono formanĝas ŝafon ene de unu horo, lupo formanĝas ĝin ene de 4 horoj kaj ŝakalo ene de 6 horoj. Dum kiom da horoj povus formanĝi la ŝafon kune leono, lupo kaj ŝakalo?”

Atentu: Laŭ mia sperto plimulto de studentoj donas ne precizajn respondojn, eĉ kelkaj el ili ne komprenas ke tiu tempo devas rezultiĝi malpli ol unu horo.

• La diablo kaj la pigrulo

“Neniu amis la pigrulon, ĉie oni kondukis lin per la vortoj: iru al la diablo! Tiel la pigrulo iris al la diablo kaj petis ĉi lastan instrui lin kiel gajni facile la monon. La diablo diris:


-Ĉu vi vidas tiun ponton? Se vi transpaŝos ĝin, la mono en via poŝo duobliĝos. Vi konstatos tion nepre. Sed por ĉi konsilo vi devas pagi al mi 24 eŭ-



rojn. La pigrulo sekvis la konsilon de la diablo kaj transpaŝis la ponton. Konstatinte envere, ke la mono en lia poŝo duobliĝis li pagis la diablon per 24 eŭroj. Sed li volis provi denove la ŝancon. Li transpasis la ponton eĉ



Ni lernu per distraĵoj



- Ekzaltig'.
- Ŝang' de ordo. Trinkaj'.
- Marŝi. Kolora punkt'.
- Grasa. Britia titol'.
- INVERSE: Eluze. INV: Fari ion ne precizigitan.
- Movata al si.
- Rilat' al brita insularo.
- Centro de metro. Korpa malmola substanc'.
- Interreta taglibr'. Numeralo.
- Hinda piul'.
- Interjekcio. Vand' malantaŭ altaro.
- Baril' el kunigitaj feraj stangoj. Ŝtona konstruaĵo.
- Korna ekstremaĵ' de birdoj. Malpac'.
- Eŭropa land'. Konjunkcio.
- Sperta instru'. Adverbo.
- Granda usona lag'. Ĉirkaŭas ies talion.
- INV: Regnokodo de la lando kaŝita en la 14a linio. Rimark'.
- Kurmanier'. Fino de milito.

VERTIKALE

- Haŭta tavolo'. Paperfoliet' kun mona valoro.
- Afrodit'. Prepozicio. Inflam' de korpaj kanaletoj.
- Teksaĵ' farita el lanaj fadenoj. Dorna arb'.
- Sufikso. Malantaŭa part' de armeo. Pronomo. Litera nomo.
- Rilat' al konfuza bruo. INV: Adverbo. Bradip'. Neforgesumin'.
- Civitan' de la lando kaŝita en la 14a linio. Ne-normala puls'. Substantiv'.
- Seksumiĝas. Vira nomo. Negi.
- Futbala avanulo. Tajla diamant'.
- Malsan' kaŭzata de ojdio. Pantalonet'. Ekzisto.

Kia mirinda simetrio!

$1 \times 1 = 1$
 $11 \times 11 = 121$
 $111 \times 111 = 12321$
 $1111 \times 1111 = 1234321$
 $11111 \times 11111 = 123454321$
 $111111 \times 111111 = 12345654321$
 $1111111 \times 1111111 = 1234567654321$
 $11111111 \times 11111111 =$
 123456787654321
 $111111111 \times 111111111 =$
 12345678987654321

SOLVOJ de la Krucvort-enigmo de la numero 172

Horizontale: 1.KOMPANANT. 2.NIKEL. ALEO
 3.TRAGEDIIST. 4. AL. AKURATA. 5.BLT. OL. 6.OBEL. ESTRI. 7.NESTAĈ. RIS. 8.IST. KIAM. 9.STERADIAN. 10. MOGADIŜ. OK.
Vertikale: 1.ANTAGONNISM. 2.KIRL. BESTO. 3.OKA. BESTEG. 4.MEGALIT. RA. 5.PLEKT. ANAD. 6.DU. EĈ. DI. 7.NAIRIS. KIŜ. 8.ALIA. TRIA. 9.NESTORIANO. TOTALISM.

ABONOJ KAJ KOTIZOJ POR 2016 ĝis 2018

La abon-periodo 2015 jam finiĝis per la lasta numero 172. Ĉi-tiu numero 173 jam estas la unua de la jaro 2016. Ĝi estas la lasta sendita al ĉiuj malnovaj abonintoj. La venontan numeron 174 ricevos nur la abonantoj de la jaro 2016.

La adres-etikedo de via Informilo informas vin pri viaj pagoj. La unua linio antaŭ la adreso konsistas el la adreso-kodo, la abon-jaro, pago (A=abonanto, F=federacia membro, poste UFE UEA ktp.) kaj eventualo pago por la sekvantaj jaroj 2017 - 2018

Se post via adreso troviĝas la mesaĝo "Fino de abono!!", tio signifas, ke vi ankoraŭ ne pagis vian abonon al La Informilo por la jaro 2016. Tiam bonvolu ĝin senprokraste pagi laŭ la ĉi-suba tarifo.

Sam-okaze eblas pagi vian UEA-kotizon laŭ la ĉi-suba tarifo al nia kasisto, kiu senprokraste ĝin perados al UEA.

| | | Jaroj: | 2016 | 2017 | 2018 |
|--------------------|---|--|-------------------|-------------------|-------------------|
| | | Abono por la papera versio: | 15 eŭroj | 15 eŭroj | 15 eŭroj |
| | | Abono al reta versio en formato pdf | 7,50 eŭroj | 7,50 eŭroj | 7,50 eŭroj |
| | | Federacia kotizo: | 7 eŭroj | 7 eŭroj | 7 eŭroj |
| | | Federacia kotizo kun atesto por viaj impostoj | 20 eŭroj | 20 eŭroj | 20 eŭroj |
| UEA | MG | <ul style="list-style-type: none"> • Individua Membro kun Gvidlibro tra la Esperanto-movado. • Individua Membro kun Jarlibro (kaj inkluzive ĝis 29 jaroj, membro en TEJO kun la revuo Kontakto sen plia abonpago). • Individua Membro-abonanto: kiel MJ(-T) plus la revuo Esperanto | | | 11 eŭroj |
| | MJ(-T) | | | | 26 eŭroj |
| | MA(-T) | | | | 64 eŭroj |
| Pagmanieroj | <p>1. Per ĝiro al la poŝtĉekkonto de nia Asocio: <u>Esperanto France-Est CCP 1997 72W NANCY</u> Ne forgesu koncize mencii la celon de via pago sur la linio "mesaĝo" de via ĝirilo. La mencio de via adres-kodo faciligas la laboron de nia kasisto: ekzemple: abono Informilo + kotizo 2016 por 1208</p> | | | | |
| | <p>2. Per bankĉeko aŭ poŝtbankĉeko je la nomo de: <u>Esperanto France-Est</u> sendita al jena adreso: S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, Francio Klarigu la celon de via pago, abono al La Informilo, kotizo, donaco al ktp por 2016, 2017 ktp. Se necese menciu vian adres-ŝanĝon aŭ adres-korekton.</p> | | | | |
| | <p>3. Por Germanio al nia peranto: Poŝtĝirokonto: 918 56-676 (BLZ 545 100 67) PGA Ludwigshafen, je la nomo de: Hans-Dieter Platz. (menciu la celon de via pago)</p> | | | | |
| | <p>4. Per internacia ĝiro je la nomo de <u>Esperanto France-Est</u> kaj uzante la jenajn internaciajn kodojn: IBAN : FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC : PSSTFRPPNCY (Ne forgesu mencii la celon de via pago kaj vian adreskodon)</p> | | | | |

De la 11a- ĝis la 16a de aprilo denove okazos staĝo pri tradukado en Bouresse, en Kvinpetalo, gvidata de Brian Moon, vicprezidanto de la Akademio.

La celo estas tradukado altnivela, sed ankaŭ plibonigo de la lingva nivelo en Esperanto, ĉar analizi tradukproblemojn povas konduki ankaŭ al lingvolecionoj. Partoprenantoj de diversaj lingvonivelejoj estos do bonvenaj.

KVINPETALO Esperanto-Centro


Akceptejo kaj poŝta adreso: 4 rue du Bureau FR-86410 BOURESSE

Retadreso: informoj @ kvinpetalo.org (forigu la spacojn)

Telefono : (+) 33 (0) 549 034 314

informoj rilate al tarifoj, aliĝo, praktikaĵoj Vidu <http://www.kvinpetalo.org/>

En julio okazos en Greziljono **longa E-kurso** paralele kun semajno de interŝanĝoj de scioj kaj scipovoj por francaj retoj RERS kaj SEL. La ĉambroj de la kastelo jam pleniĝis. Se vi bezonas liton kaj deziras elekti ĉambron, tiam vi devus tre baldaŭ aliĝi. Christian Rivière gvidos 10-tagan Esperanto-kurson pri LA ESPRIMO DE LA TEMPO kompare en Esperanto kaj la franca. Ni konsilas ke vi legu la romanon*** *Les heures souterraines* de Delphine de Vigan, aŭ la esperantlingvan version *La horoj subteraj*. Ekster la kursoj vi povas profiti la interŝanĝojn proponitajn de la RERS-membroj kaj SEL-istoj. Informoj en <http://www.gresillon.org/s2>, aliĝoj en <http://gresillon.org/alighos>



YVES NICOLAS

NIA VOJAĜO EN IRANO

Jam pasis pluraj semajnoj post nia vojaĝo en Irano, sed regule venas plu al mi rememoroj pri tiu ne forgesbla restado. De multaj jaroj mi volis viziti tiun landon ne nur pro ĝia antikva historio sed ankaŭ pro famaj urboj kaj verkistoj, filmistoj. Mi volis ankaŭ kompari, per surloka konstato, la informojn, kiujn dissendas nia gazetaro pri la ĉiutaga influo de tiea reĝimo, kies fundamentoj radikale malsamas de la "okcidentaj".

Kiam aperis en "Esperanto" reklamo pri turisma aranĝo en Irano por esperantistoj, mi tuj kontaktis la informinton, Masud Godarzi. Malgraŭ lastminuta rezigno de dudek persona grupo, kiu devigis lin ĉion modifi, Masud tre sukcese organizis por mia filino Sophie kaj por mi dektagan vojaĝon. Li dorlotis nin, ĉiam atentema, ĉu ni soifas, ĉu ni malsatas. Ni tranoktis kaj manĝis en bonaj hoteloj kaj restoracioj, kaj ni uzis komfortajn aŭtobusojn. Li starigis interesan itineron. Post unu taga restado en Teherano, kies trafiko forte impresis nin, ni vizitis lian propran urbon Borujerd. Tiu mezgranda kaj provinca urbo estas tre agrabla kun vasta parko sur proksima monto. Ni konatiĝis kun liaj edzino Mansureh kaj filo Amirali kiuj varme akceptis nin. Poste, ni iris al Isfahano. Ho! Isfahano! Vera juvelo pro belegaj moskeoj kaj Palaco Ali Qapu ĉirkaŭ grandega placo, rendezuo de la loĝantoj por vespera pikniko kaj promenado post varmega tago. Pro la ĝardenoj "Ok paradizoj" kaj "Kvardekkolona Palaco". Pro ĝiaj antikvaj pontoj Si-o-se Pol kaj Pol-e Khaju de la Sasanida kaj Safavida periodoj, kiuj bedaŭrinde transiras tute sekigitan riveron, kies akva devojigo fare de la instancoj kolerigas la loĝantojn kaj la lokajn terkulturistojn. Bela Isfahano ĉu iam mi vin revidos ?

Ŝirazo estas tre ŝatata de la irananoj pro ĝiaj citadelo kaj bazono sed ankaŭ pro la tomboj de Sa'adi kaj Hafez, du mezepokaj poetoj, kiuj laŭdis amon, virinojn kaj vinon en siaj verkoj, kiuj humure aŭ acide kritikis falsajn

kredantojn. Multaj homoj venas por murmure deklami iliajn poemojn kun mano tuŝanta la tombon. La irananoj havas grandan respekton kaj amon por tiuj poetoj, ankaŭ por Ferdosi kaj Omar Kajam, kiuj defendis la persan kulturon. Jes ja, Persio havis longan historion, kies plej fama atesto estas la ruinoj de la tutmonde konata Persepoliso. Temploj, kolonoj, skulptaĵoj regas la okulojn de la turistoj, kiuj povas imagi la tiean vivon 2500 jaroj antaŭ Jesuo-Kristo sub regno de Ciro, Dario kaj aliaj famaj reĝoj. Ni tute hazarde renkontiĝis, apud la Trezorejo de Persepolis, kun Florent, franca esperantisto el Orléans!

Ni poste revenis al Teherano por ĉeesti la dutagan Duan Iranan Kongreson de Esperanto. Hamzeh Shafiee kaj lia edzino Marzieh tre afable gastigis nin en sia loĝejo kun Bahar kaj Dorsa siaj ĉarmaj kaj ludemaj filinoj. Teherano enhavas 14 milionojn da loĝantoj sur vasta, monteta tereno kiun senĉese, rapide, zigzage, brue trairas ne nombrebaj aŭtomobiloj –ofte Peugeot kaj Renault- kaj motorcikloj, kiujn rajdas ĝis 3-4 homoj, kompreneble senkaskaj. Ankaŭ Hamzeh tre lertis por ŝofori ĝis la kongresejo en la moderna Distrikto 22a. La kongreso okazis en la kvartala domo kun granda halo, kie staris la akcepta kaj la libra budoj; ankaŭ tie ni paŭzis kaj tagmanĝis. Apude, vasta spektaklejo kun komfortaj seĝoj kaj granda scenejo kun ekrano. La tuta aranĝo estis profesi-nivele filmita kaj fotita. La kongresanoj ricevis belan teknon kun e-a flagego kaj kongresa programo.

Sur la librotablo, prizorgita de Amir Fekri,



aĉetebraj libroj ne estis tre multaj sed proponis interesajn titolojn. Mi notis i. a. "Versoj de Persoj", kiun redaktis Keyhan Sayapour, prezidanto de IREA kaj dikan lernolibron por irananoj verkitan de Ahmad Reza Mamduhi, vicprezidanto kaj "orkestra estro" de la kongreso.

En la kongresa ĉambro estis belaj kaj memstaraj prikongresaj afiŝoj. Aliaj estis gluitaj sur la muroj, kelkfoje kun la portreto de Zamenhof. Mi aparte ŝatis iun ruĝan kun verda stelo malantaŭ fermita pugno por krei: "Esperanto, Ribela lingvo!".

Proksimume kvindek homoj partoprenis tiun kongreson, inter ili 4 eksterlandanoj, Masaja Seŝimo el Japanio, Guy Perrin (kiu ankaŭ ĉeestis la unuan iranano kongreson), Sophie kaj mi el Francio. La organizintoj esperis pli da eksterlandanoj, kiel pasintjare sed mi opinias, ke reklamado kaj informoj sur la retpaĝo de la asocio ne estis sufiĉe multaj kaj precizaj (ekz. la adreso de la kongresejo ne estis indikita). La irananoj tuj deziris paroli kaj foti kun ni en tre amika etoso. Ni sentis nin en granda familio ekde la unua minuto ĝis la fino de la kongreso. "Esperanto ribela kaj amikeca lingvo"!

En si mem, la irana kongreso ne tre malsamas de alilandaj kongresoj: malferma ceremonio (eroj el Korano kaj nacia himno mirigis min), salutvortoj, primovadaj raportoj, prelegetoj, kulturaj spektakloj. Oni kelkfoje ŝatus, ke la programeroj akurate okazu, ke iuj prelegoj estu malpli longaj (nura legado de teksto iel tedas), ke la arta parto estu pli alloga, sed okazis interesaj intervenoj pri la progreso de la movado (sidejo en Teherano, eldono de libreto "Nigra fiŝeto", espero pri kursoj en universitato aŭ en lernejoj, rilatoj kun esperantistoj en najbaraj landoj ktp) kaj pluraj prelegoj kun temoj originalaj, i. a. "Lingvismo kaj lingvokratio" de Ahmad Reza Mamduhi, "Distrikto 22" de Hamzeh Shafiee, de Akbar Sedaghat pri defendo de la persa lingvo, kaj de la kuraĝa kaj novbakita junulo Kianush Hemmati pri Aviceno, granda kuracisto kaj saĝulo de la Deka Jarcento.

Estis bona ideo de la organizintoj afable proponi al Masaja, Guy kaj mi prelegi pri respektive "Niŝomaru, unu simbolo inter Irano kaj Japanio", "ĉiĉeronado dum UK en Lille",

"Normandio".

Ni ne forgesos la vesperan promenadon, sub dolĉa ĉielo, laŭ la granda kaj bela Ĉitgar Lago, nova rendevuo de multaj teherananoj. Ĉiuj kongresantoj ĝoje babladis, petolis, fotadis, interŝanĝis pri multaj aferoj en tre amika etoso.

Ni ankaŭ ne forgesos la postkongresan viziton al la grandega Milad Turo (de supre ni panorame vidis la tutan urbon) kun Mehdi Zargaripur, Nazi Solat, Giti Ferdosnia, Hamid Shaeri, Akbar, Ahmad kaj aliaj, la promenadon kun Kianush, Fariborz, kaj Sahar kun siaj du filinoj en la montaro, la viziton al la Parko de la Artistoj kun Nazi kaj la tiea tre bongusta vespermanĝo en vegetara restoracio.

Ni ne forgesos la viglan kaj ege interesan Iranon, ĝian afablan kaj akcepteman popolon.

Esperantistoj el la tuta mondo, nepre ekskursu al Irano! Tie atendas vin fervoraj samideanoj, kiuj ŝatas kontaktojn kun eksterlandanoj por babili, por kompari, por kune evolui al pli tolerema kaj pacama mondo.

“ Ho ! Isfabano! Vera juvelo
pro belegaj moskeoj kaj Palaco Ali
Qapu ĉirkaŭ grandega placo, ... Pro la ĝardenoj
«Ok paradizoj» kaj «Kvardekkolona palaco».
Pro ĝiaj antikvaj pontoj Si-o-se Pol kaj Pol-e
Khaju de la Sasanida kaj Safavida periodoj
Bela Isfabano ĉu iam mi vin revidos ?



TRAFIK-RIMEDOJ EN SRILANKO

Fine de oktobro 2015 ni vizitis Srilankon, kie ni partoprenis la 3-an Sud-Azian-Seminarion. Tiuokaze eblis iom konatiĝi kun la lando. La aranĝo okazis en la urbeto Katunayake situanta 30 km norde de Kolombo. Tiu-ĉi plej granda urbego havas 1 550 000 enloĝantojn. La ĉefaj religioj estas budhismo, hinduismo, kristanismo kaj islamo. Oficialaj lingvoj de la lando estas sinhala, tamila kaj angla.



TRAJNOJ

Kiel eksfervojistino mi interesiĝas pri la trajnoj en ĉiuj landoj, kiujn mi vizitas.

Bedaŭrinde en Srilanko ne estis ebleco vojaĝi trajne. Tamen ni havis aliajn spertojn.

En Katunayake, kie ni loĝis, mi kun mia edzo Floreal promenis ĝis la fervojstacio. Atendante la pason de trajno ni vizitis la oficejon de la staciestro, kiu tre afable akceptis nin kaj klopodis per la angla lingvo klarigi al ni kelkajn detalojn pri la fervojo en Srilanko.




Alian, ankaŭ agrablan akcepton ni spertis en Kolombo. Ni vizitis la trafikan regadcentrejon, kiu troviĝas ĉe la kajo kaj deĵorantoj tre afable enirigis nin kaj permesis fotadon en la reĝejo kaj ĉe la apuda biletejo. Nur la konversacio ne tro facile fluis pro manko de lingvoscio. Vojaĝado tra la insulo per trajno ne multe kostas.





Fervojlinioj en Srilanko longas 1 449 km. Ekzistas kvar ĉefaj fervojlinioj. En ĉiuj direktoj la trajnoj cirkulas plurfoje tage. Vagonoj estas malnovaj kaj la trajnoj ne rapidas. Trajnkonektojn konstruis Britoj en la tempo, kiam Srilanko estis ilia kolonio. De tiuj tempoj ne multo

ŝanĝiĝis. Linio de Kolombo ĝis la urbo Kandy, la koro de la insulo, estas konsiderata kiel la plej ĉarma, ĉar ĝi pasas tra belegaj pejzaĝoj.



AŬTOBUSOJ

Kelkfoje ni spertis busvojaĝojn. Aŭtobusoj estas bele kolorigitaj. En Srilanko oni veturas maldekstre, sed kutime ŝoforoj veturas en

strio, kiu estas pli libera. Aŭtobusoj havas pason antaŭ ĉiuj aliaj veturiloj. Simplaj busoj ne estas tre komfortaj. Ne ekzistas fiksa bushoraro, oni devas atendi, kiam la buso pasas kaj poste rapide eniri, foje eĉ saltante, ĉar ĝi ne haltas komplete, se nur unu aŭ du pasaĝeroj atendas ĝin. La



survoje krie anoncas laŭ kiu klopodas enirigi kiel eble plej kiam la buso estas plenplena, monon. Tio foje ne facilas pro homoj. Tamen neniu eskapas



akompananto de la ŝoforo vojo la buso pasos kaj multe da pasaĝeroj. Nur tiam li komencas kolekti la tre forta kunpremiĝo de la de la pago.

“TUK-TUK”

estas la plej uzata kaj malmulte kosta trafik-rimedo por ne tro longaj distancoj. Ĝi estas tri-rada elektra veturileto kun kajuto por tri aŭ kvar personoj. La prezon oni kutime fiksas antaŭ la vojaĝo, same kiel en taksioj. “Tuk-tuk” estas tre disvastigata kaj ŝatata veturilo en la tuta lando.



MEDITERANEA ESPERANTO-SEMAJNO

2016



Restadejo Val d'Esquière – Les Issambres – Francio (Lazura Marbordo)

5a - 12a de Marto
2016

Tiu Esperanto-semajno ĉe la Lazura Marbordo iĝis jam tradicia renkontiĝo por pluraj samideanoj en komenco de marto. Tie eblas ĝui printempan veteron, amikan etoson en internaciaj Esperanto-rondoj.

Raportas pri ĝi Daniel Moirand.



De la 05-a de marto ĝis la 12-a okazis en Les Issambres (apudmediteranea urbeto) la 10-a tutsemajna renkontiĝo de multaj Esperantistoj. Ĉeestis ĉirkaŭ cent partoprenantoj el dekunu diversaj eŭropaj landoj.

Kiel kutime Monique Prezioso kaj Christine Graissaguel zorgis pri la starigo de ĉi tiu semajno en la luksa ferihotelo Vacancier. Tiu restadejo proponas ĉambrojn en la ĉefa konstruaĵo, aŭ ĉaledojn en la tuj apuda monteto.

La manĝaĵoj estis variaj kaj abundaj kun diversaj enirpladoj, desertoj, kukoj, fruktoj kaj glaciaĵoj

La kursoj aperis laŭ kvar niveloj: la unua por la personoj sen antaŭa kono de Esperanto (Christine Graissaguel, el Francio), la dua por komencantoj (Mala Jarka, el Ĉeĥio), la tria-paroliga (Gražina



Tiom da ĉokolado



Les Issambres 2016 antaŭ la hotelo

Opulskiene, el Litovio) kaj la kvara (Miguel Gutiérrez Adüriz, el Hispanio) : matene, li konatigis la ĉeestantojn kun la sistemo de mikronoveloj, posttagmeze li plurfoje kantigis la dezirantojn per hispanaj kantoj tradukitaj en Esperanton). La laboraj horoj okazis de la 9-a 15 ĝis la 10-a 30. Tiam okazis grava paŭzo kun teo, kafo, kukoj...kaj babilado. Je la 11-a rekomenciĝis la kursoj ĝis la 12-a. La posttagmezo, libera ĝis la sesa, ebligis diversajn ekskursojn, ĝis la retroiro al laboro dum plia horo.

Je la oka kaj duono okazis diversaj kulturaj aranĝoj : sabato vespere – interkona vespero; dimanĉe vespere : kortuŝa teatraĵo kun Sylvaine Lemagadure kaj Hélène Seigle, *La viro-semo* en esperanta traduko. Ili prezentis ĉi tiun saman teatraĵon kvarfoje dum la UK en Lille. Kelkaj spektantoj havis tiel la eblon revidi ĝin.

Lunde vespere, Thierry Saladin prezentis prelegon pri Esperanto en Eŭropo. Marde vespere, Guy Perrin parolis pri la unua irana esperanta kongreso en la ĉefurbo Teherano. Multaj lumbildoj akompanis tiun neordinaran prezentadon

La partoprenantoj de la kvara kurso malkovris la ekziston de mikronoveloj.

Miguel Gutiérrez Adüriz proponis legi kelkajn tiajn novelojn el la libro **Ne ekzistas verdaj steloj**.

La misteraj mikronoveloj kreis miskomprenojn, sed ankaŭ multe da diskutoj, kaj viglan partoprenon de la ĉeestantoj.

Ne ekzistas verdaj steloj

de la esperanta movado en tiu fora lando

Merkrede vespere, Gražina Opulskiene konatigis nin kun sia lando Litovio, sufiĉe malbone konata en Francio. Jaŭde vespere, Jean-François Cousineau parolis pri Ĉilio kun multaj lumbildoj (kaj aldonaj lumbildoj pri la insulo Pasko).

La lastan vesperon okazis la diversaj dankaj donacoj al la kursgvidantoj, la kutima loteriado, kelkaj skeĉoj kaj kantadoj (far la partoprenantoj de la kvar studgrupoj), post kio, Josiane Prezioso kun ŝia akordiono dancigis ĉiujn dezirantojn.

Ampleksa libroservo ĉiam malfermita (Jean-Pierre kaj Françoise Schneider plus Claudie Demongeot) proponis al ĉiuj diversajn librojn por la legantoj.

Diversaj ekskursoj ebligis pli bonan konatiĝon kun la regiono : vizito de la

Teatraĵo: La Vira semo



Amforoj en la historia muzeo



Vigle kaj amuze gvidis Gražina sian kurson

Mikro-noveloj

Misteras la enhavo de tiaj noveletoj, ege mallongaj kun ofte enigmaj signifoj. Certe la aŭtoro kapablas klarigi la signifon, la celon, kvankam la legantoj povas siavice havi siajn proprajn komprenojn, kaj eĉ mem inventi aŭ imagi tute malsamajn klarigojn.

Tiam ne plu eblas scii, kiu fakte pravas, sed eble ĝuste tiaj noveletoj povas instigi al inventemo, aŭ eĉ al propra verkado kun persona stilo aŭ fantazio.

La verkanto proponas, la legantoj decidas.

Mallongas la teksto, abundas la variantoj.

Tial ni ĝuu nian propran inspiron kaj fantazion.



Kvara kurso pri mikronoveloj

urbo Fréjus, vizito de la fuorto Bregançon (somera rezidejo de la francaj prezidentoj), vizito al la historia muzeo en Saint Raphaël, paŝado tra la montaro Les Maures.... La hotelo siaflanke, proponis diversajn aktivaĵojn (karaoke, muziko, dancado...).

Jen finiĝis la deka renkontiĝo en Les Issambres kaj ĝis la venonta jaro en la sama loko, kun la sama agrabla etoso....

Raporto: Daniel Moirand,
Fotoj: Andreo Grossmann

Honorigo al la kursgvidantoj



Miguel Christine Jindra Gražina

TRAJN-VOJAĜADO EN BARATO - 2015

Pasintjare aŭtune ni spertis interesan trajnvojaĝon en Barato. La vojaĝo konsistis el tri etapoj: *Gorakhpur-Chennai*, *Chennai-Kolkata* kaj *Kolkata-New Jalpaguri*. La plej vasta fervojreto en Azio troviĝas en Barato. Preskaŭ la tuta lando havas alireblecon al la fervojo, escepte de kelkaj montaraj regionoj en la nordo kaj nordoriento. Ĉirkaŭ 11 000 trajnoj cirkulas ĉiutage tra la lando.

La veturado per trajno ne multe kostas en Barato.

Kun grupo de Nepalanoj ni vojaĝis per trajno de la urbo *Gorakhpur* en norda parto de

Barato ĝis la sudo al la urbo *Chennai*. La stacidomo de la urbo *Gorakhpur* tre imponas kaj posedas la plej longan kajon en la mondo pri kio oni prave fieras. La kajo mezuras 1366 metrojn.

Sur la reloj laŭ unu kajo povas samtempe halti du trajnoj, ĉiu el ili havante ĝis 26 vagonoj. Estas konate, ke la barataj trajnoj longas kelkcentojn da metroj.


La pasaĝer-trajno konsistas el diversaj klasoj de vagonoj. Ni elektis la plej simplan kaj malmulte koston kuŝvagonon.

Unua impresio ne tro allogas. Malgrandaj fenestroj kun kradoj elvokas vagonojn por brutaro. Dum la tago oni sidas kaj nur vespere oni mallevas mezan kuŝlitan. Oni povas ankaŭ kuŝi dumtage en la supra parto. Ne estas litaĵoj, kelkaj homoj mem alportas kovrilon. Estas tri niveloj de kuŝlokoj, ĉe la koridoro kontraŭ la fenestroj nur du kuŝlokoj. Sur la plafono estas fiksitaj grandegaj ventumiloj. Lumoj kaj elektroinstalaĵoj foje ne funkcias. Necesejo estas tre malpura, apude en la koridoro estas lavujo sen sapo, super ĝi spegulo. Fojfoje ankaŭ venas purigistoj.





Dum la vojaĝo la eksteraj pordoj estas konstante malfermitaj ambaŭflanke kaj la homoj staras aŭ sidas ĉe ili. Iuj ankaŭ alsaltas veturantan trajnon. En la trajno eblas mendi tagmeze kaj vespere manĝon, kiun oni pretigas en unu el la vagonoj.



Post la konsumado la malplenaj skatoloj kaj boteloj estas ĵetataj tra la fenestro. Laŭvoje amasiĝas rubaĵoj. En la trajno mem



ne estas rubujoj, do la homoj ĉion ĵetas eksteren. Rubujoj troviĝas kutime sur la kajo. Tra la vagonoj senĉese pasadas vendistoj, kiuj proponas kafon, teon, akvon, manĝaĵojn, fruktojn, nuksojn, ŝtofojn, librojn, gazetojn, infan-ludilojn kaj multajn aliajn utilajn aŭ neutilajn aĵojn.



De tempo al tempo aperas almozuloj kaj iuj religiuloj. Ankaŭ en la stacioj, kie la trajno haltas atendas vendistoj kaj proponas ĉefe trinkaĵojn kaj diversajn manĝaĵojn foje pretigataj antaŭ niaj okuloj. Plej okulfrapas homoj kaj bestoj libere promenantaj inter la reloj.



Sur la kajoj kaj ĉe la reloj ofte promenas hundoj, kaproj, porkoj kaj eĉ simioj. Apud nia trajno trankvile paŝadis zebuo (ĝibobovo).

Entute ni trajnvojaĝis 4 334 kilometrojn kaj en la trajno ni pasigis 83 horojn kun neforgeseblaj memoraĵoj.

Liba Gabalda

